

Kelkaj novaĵoj kaj kuriozaĵoj de la scienco okazintaj ekde la apero de la pasinta eldono de Scienca Revuo.

Enloĝantoj sur Marso, ĉu finfine trovitaj?

Ekde aŭgusto 2012 la esplorroboto "Curiosity" aktivas sur Marso kaj transsendas bildojn kaj datumojn al la tero. La 2-an kaj 3-an de Aprilo ĝi sendis bildojn montrantajn misteran lumeton en la marsa pejzaĝo. Ĉu marsano spektanta televidon? Verŝajne ne. Pli verŝajnas, ke temas pri flagra refleksaĵo de la suna lumo pere de roko [2].

Ĉu nova paŝo al teknika nuklea fuzio?

Nuklea fuzio estas longe diskutata ebla fonto de energio. Kompare al uzata kaj multe kritikata nuklea energifonto, la nuklea *fisio*, la nukleoj ne estas disigitaj por gajni energion, sed male du nukleoj estas maldisigitaj al nova nukleo. Tiu procezo liberigas energion, kion oni klopodas uzi. Ekzemple oni maldisigas du hidrogenajn atomojn al unu helioma atomo.



Bedaŭrinde tiu principo ĝis nun nur funkciis por milita uzo, la hidrogena bombo, por kiu oni uzas nekontrolatan procezon. Ĉiuj provoj kontroli la procezon ĝis nun liveris malpli da energio ol ili postulis.

Esploristoj el Kalifornio [1] sukcesis per lasera pulso kaŭzi fisian, kiu liveris fakte pli da energio ol oni devis elspezi. Tio eble estas paŝo al la teknika uzo de nuklea fuzio kaj eble paŝo al la solvo de energiproblemoj. La atingo de la vizio, prizorgi la homaron per pura kaj sekura energio el nuklea fuzio estas certe ankoraŭ tre tre for. Certe ankoraŭ okazus multe da Esperanto-aranĝoj sen energio el nuklea fuzio.

Bibliografio

- [1] O. A. Hurricane k.a. "Fuel gain exceeding unity in an inertially confined fusion implosion". En: *Nature* 506.7488 (2014), 343–348. DOI: [10.1038/nature13008](https://doi.org/10.1038/nature13008).
- [2] G. Webster. *Images From NASA Mars Rover Include Bright Spots*. URL: <http://www.nasa.gov/jpl/msl/mars-kimberley-20140408/index.html> (vizitita 2014-04-09).